

Esperanto-Fervojo



U.A.I.C.F. / A.F.C.E.

Association Française des Cheminots pour l'Espéranto

J.O. Associations n° 304—du 25/12/1949



Jul – Majo – Jun 2014

N° 676

3,50 €

San Benedetto del Tronto

P 2 - 3

Ĉefartikolo

P 4 - 5 - 6

IFEF Kongreso 1

P 7

Exposition

P 8 à 11

IFEF Kongreso 2

P 12 - 13

Individua Esprimo 1

P 14' - 19

Individua Esprimo 2

P 20 à 23

Individua esprimo 3

P 24

Kiel lerni
Esperanton?



Akceptosoleno de IFEF-respondeculoj en la urbdomo

Trimonata Franca Fervojoista Bulteno

Organe d'information culturelle pour la diffusion de l'Espéranto

9 rue de Château-Landon –FR 75475 Paris Cedex 10

Quelles Solutions ?

Vive les vacances ! À l'aube de l'été les écoliers vont ranger leurs cartables aux oubliettes, après tant de mois passés à apprendre le monde et ses péripéties de hier et d'aujourd'hui. Des interrogations vont trotter dans leurs cerveaux, telles des images aux couleurs d'espérance ou de désillusion. Les vacances d'été vont être pour un temps la récompense qui régénérera leur enthousiasme et les fera grandir pas à pas. Ainsi se déroule le cycle permanent de la vie.

Les associations vont aussi ranger leurs cartables en cessant de penser à la planification de leurs programmes annuels. Chacun de leurs membres va se séparer des contraintes - toutefois agréables - que représentent les réunions pour définir la marche à suivre de l'association et les programmes qui s'y rattachent.

L'Association des Cheminots pour l'Espéranto n'est pas en reste et, hormis peut-être la participation à un congrès d'été, beaucoup parmi ses membres vont s'isoler dans un rythme de vie apaisant et se

plonger dans une méditation plus propice à la réflexion qu'à l'action. Pour beaucoup d'entre nous ce sera sans doute l'occasion de faire de nouvelles rencontres et d'ébaucher avec elles, entre le plat et le dessert, des sujets divers dont celui de l'espéranto et de convaincre l'auditeur de tenter une période d'essai pour une étude gratuite de trois leçons, pendant quelques mois, afin d'attiser sa curiosité. Si l'essai lui paraît concluant il pourrait ensuite adhérer à notre association.

Une autre action peut aussi être réalisée : celle de réunir les personnes isolées qui apprennent l'espéranto par Internet en provoquant leurs rencontres pour stimuler leur intérêt à l'usage de la langue. Mais est-ce possible de répertorier leurs identités ?

Ce sont les convergences de multiples idées nouvelles qui développeront les moyens pour faire connaître et propulser davantage notre association.

Cependant, prenons conscience collectivement, que malgré notre meil-

leure volonté, des freins puissants perturbent et s'opposent à l'évolution des associations et au plus culturel de la société en général. Ce sont les brimades des instances de décisions qui laminent toujours davantage les moyens d'expansion en restreignant les crédits alloués, conduisant à faire de la culture populaire une zone secondaire qui n'aurait de suffisance que celle de vivoter et à terme de disparaître. Dans le numéro Internacia Fervojisto 2014-3 l'autrichien espérantiste Martin Stuppniĝ met l'accent sur les raisons majeures qui bloquent l'épanouissement culturel de nos sociétés sous le joug d'une oligarchie financière destructrice des valeurs universelles indispensables dans la vie intergénérationnelle

et pluriculturelle de nos sociétés. Je vous invite à consulter cette lecture.

Bonnes vacances sereines et studieuses à vous toutes et à vous tous pour réfléchir au mieux-être de notre association universelle et analyser les solutions pour y parvenir : par exemple celle parmi d'autres de marteler inlassablement la volonté d'une Europe avec une langue passerelle neutre afin d'assurer une communication interne fiable et mettre fin à cette gabegie de traductions simultanées qui, à travers des techniques sophistiquées, conduisent pourtant à une invraisemblable cacophonie coûteuse autant qu'infructueuse.

Jean Mével

-0-0-0-0-0-0-0-0-0-0-

**Notre prochaine assemblée générale AFCE se tiendra
du 11 au 14 avril 2015
en Bourgogne
dans la très belle ville gastronomique de Dijon.**

Nous visiterons la ville ; nous goûterons ses spécialités :
le cassis, le pain d'épice, la moutarde et bien sûr le bon vin !

Nous visiterons sa très belle région avec le Château de Commarin,
le village de Châteauneuf, **puis** nous partirons sur la route des vins.

Nous vous y attendons pour boire un petit coup et passer,
ensemble, un moment inoubliable !!!

IFEF Kongreso en San Benedetto del Tronto

La 66-a IFEF kongreso, kiu okazis en Italio, en San Benedetto del Tronto, borde de la



Adriatika maro, alportis al la ĉirkaŭ 140 parteprenantoj grandegajn multflankajn kontentiĝojn. nombraj ekskursoj malkovrigis al ni, tra muzeoj, preĝejoj, monumentoj, la grandan kulturen riĉecon de la regiono Marko, sude apud la regiono Abruze kaj ĉe la Adriatika maro.

Sabaton, la 17-an de majo, la momento estis rezervita al interkona vespero, iom



San Benedetto del Tronto

mallongigita pro la longaj lacigaj vojaĝoj por atingi San Benedetto. Post la solena malfermo de la kongreso, dimanĉe posttagmeze, la kongresanoj piedirante kun profesia ĉiĉeronino lernis la historion de la nova bela urbo San Benedetto, kiu jam spiras vokon al baldaŭa somero. Bela vetero, palmoj, la larĝa strato al la maro instigis al revo kaj, por kelkaj el ni, al bano en la marakvo preskaŭ varma.

Ĉiutage okazis la diversaj planitaj laborhoroj, dum kiuj la elektitaj landrespondeculoj kunvenis por pridiskuti le estontecon de nia Federacio kaj la diversajn punktojn, teknikajn aŭ aliajn enskribitajn en la tagordo.


Lunde, post matena vizito de la mara muzeo de San Benedetto, okazis duontaga ekskurso posttagmeze al la urbo Ascoli Piceno kiu estas la ĉefa distrikta urbo. Tiu urbo, kie loĝas pli ol 51 miloj da homoj estas ege riĉa je malnovaj monumentoj, domoj, preĝejoj, muzeoj, palacoj kun mezepoka nobla arkitekturo.

Sperta ĉiĉeronino talente klarigis al ni, piedirante tra la urbo

kaj ĝiaj mallarĝaj stratetoj, la riĉan historion de tiu urbo kiun ni divenas per la koloro de la ŝtonetoj kiel konstruaĵo kaj arkitekturo mez-epoka.

Marde matene, la publika plenkunsido rendezuis nin kun la realecoj de la funkciado de nia asocio : novaj decidoj voĉdonitaj, ŝanĝoj de parto de la statutoj, novaj proponoj certigitaj por estontaj kongresorganizado ktp...

Merkrede, okazis la tuttaga ekskurso kiu veturigis nin tra la tuta regiono, en ĝia interna kampara aspekto. Ni mal-kovris aliajn urbetojn situantajn en pli altaj altitudoj, kun sama malnova bela arkitekturo de la domoj sed ankaŭ kun alrigardo al la imponaj vinberejoj kiuj ornamas la flankajn montetojn. Dumtage ni vizitis diversajn lokojn : Loreto, Recanati, Castelfirdado, Muzeo Omero en Ancona, kie estis menciindaj inter ĉiuj ricaj kulturaj vizitoj tiuj kiuj rilatis al la historio de la enmigrada



popolaro en Argentinon por trovi laboron, ankaŭ la muzeo, en kiu ni povas libere mantuŝi skulptartaĵojn, kaj ankaŭ tiu ĉarma loko kie troviĝas multegaj akordionoj kun la unua modelo inventita de Léonard de Vinci. Ĝoja memoro ankaŭ al la originala majstro kiu ravis nin ludante belan akordionan muzikon varmigante niajn korojn.

Ĵaŭde, pli ripoza tago kies posttagmezfino vidis la solenan malfermon de la kongreso kun la transdono de la flago al la ĉina reprezentanto kiu invitis nin por la 67-a kongreso en la urbo Kunming, ĉina regiono Yunnan.

Vendredon, matena duontaga ekskurso transportis nin al Ripatransone kaj al Offida, kie ni gustumis bonajn tostojn kaj vinon nomitan «Esperanto». Ni malkovris

multajn diversajn belaĵojn kiuj indas



*Pasado de la flago kaj donaco
al la ĉina reprezentanto*

grandan intereson.

Por konkludi tiun artikolon mi nepre menciu la distrajn vesperojn, kiuj ĉiam honorigas niajn kongresojn alportante al ili la etoson propran al niaj renkontiĝoj. Dimanĉe vespere, la talenta Maria Grazia Barboni, kiu lernis muzikon ĉe la universitato de Ancona kaj tradukis plurajn kanzonojn esperantlingven, regalis nin per sia voĉo kaj belaj tekstoj memore al famkonataj aŭtoroj kiel Edith Piaf kaj kelkaj aliaj. Lunde, denove vespera belega muziko dank'al la muzikgrupo nomata : Trio Malamuzika. Merkrede, la majstro Manuel revizitis sole al ni la kanzonojn el la jaroj

1960/70.

F infine, jaŭdon kaj vendredon, la vespera programo okazis ekstere en loko inter palmoj, sub lumo kiu kontraŭstaris la noktigon. Orkestro kun kantistino kiu voĉe kaj muzike vokis nian emon al dancoj diversaj. Ĉina amiko surprizis la ĉeestantojn kantante « O Sole mia » kun perfekta tenora voĉo. Vendrede venis la tempo de la regiona folkloro grupo, kies dancoj diversaj rakontis la tradiciojn kaj la vivon de la apuda Abruza regiono.

Sabate, ĉiuj forlasis San Benedetto-n krom la kongresanoj kiuj aliĝis al la postkongreso. Koran dankon al la organizantoj de tiu belega sukcesa kongreso



en paradiza loko. Ĝis la revido venontjare en Ĉinio.

Jean Mével

EXPOSITION: « LA LANGUE ESPÉRANTO AU SERVICE DES HOMMES PENDANT LA PREMIÈRE GUERRE MONDIALE »

Cette exposition, conçue par la Fédération Espéranto-Bretagne, avec l'aide de la commission spécialisée d'Espéranto-France et de Christian Lavarrenne, docteur en Histoire, conseiller historique, se présente sous la forme de huit panneaux, qui traitent aussi bien de l'espéranto, langue neutre proposée comme langue de paix, que de l'utilisation de cette langue par les militaires pour la propagande française ou allemande, par les familles grâce au service de correspondance familiale mis en place par le siège de l'Association mondiale d'espéranto à Genève, par les prisonniers de guerre, et enfin par la Croix-Rouge Internationale, grâce notamment aux lexiques de vocabulaire sanitaire distribués aux infirmiers militaires.

Les services de la communauté de communes de Montfort-sur-Meu (Ille-et-Vilaine) en ont gracieusement effectué la mise en page et l'impression en deux jeux d'affiches A2.

Du 24 mars au 17 avril 2014, Mireille Grosjean, de nationalité suisse, spécialiste en éducation interculturelle,

a sillonné l'Ouest de la France pour une série de conférences, où elle a traité notamment d'éducation à la paix. Cette exposition l'a suivie dans sa tournée à Montfort, Dinan, St Malo, St Brieuc, Plouézec, Vannes. Elle en a emporté une copie pour la présenter en Suisse.

L'exposition a également été présentée les 5-6 avril au congrès national AFCE des cheminots espérantophones à Plestin-les-Grèves et le 13 avril à l'Assemblée générale de la Fédération Espéranto Bretagne à Lou-déac. Elle sera bientôt proposée en même temps que le film « espéranto » de Dominique Gautier au cinéma d'Arzon, dans la presqu'île de Rhuys.

Il reste maintenant à assurer la promotion dans les médiathèques, archives départementales, associations et organismes divers, dans le cadre des commémorations de la première guerre mondiale.

Pour tous renseignements : Josette Ducloyer, vice-présidente de la Fédération Espéranto-Bretagne: Tél 02 99 09 71 92

jducloy@club-internet.fr

La 66-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO

17 - 24 majo 2014

Jam la sesan fojon fervoj-istoj kongresis en Italio. Ĉi-foje la evento okazis en San Benedetto del Tronto, kiu situas ĉe la Adriatika marbordo proksimume 300 km-ojn sude de Bolonjo. Ĝi estas precipe turisma urbo ornamita per palmoj. Ili beligas la urbon laŭlonge de strandoj. La pasantoj ĝuas ilian agrablan ombron ankaŭ **sur** promenejoj kaj stratoj. Ĉe la havena moleo impresas reliefe skulptitaj pentritaj ŝtonblokoj, kie multaj vizitantoj ŝatas promeni kaj admiru tiujn nekutimajn artaĵojn.

La kongreson partoprenis 135 geesperantistoj el 19 landoj. La plej malproksimaj venis el Ĉinio, Israelo kaj Kubo. La ĉina delegacio venis ĉefe por inviti la partoprenantojn al la venontjara fervojista kongreso okazonta en la urbo Kunming en Ĉinio. Estis prezentata mallonga filmo por montri al ni la medion, en kiu oni kongresos.

La kongreso okazis en la kvarstela hotelo Calabresi, kie ni estis varme akceptataj kaj bone nutrataj per bongustaj manĝaĵoj.



La hotelo estis bone lokita apud la urbocentro kaj tute proksime al la



Omaro

plaĝo kvar kilometrojn longa. En la kunvensalono de la urbodomo estis instalita ekspozicio de la miniatura regiona fervojlinio kun funkciantaj trajnetoj. Vid-al-vidaj paneloj informis pri la okazanta kongreso kaj pri Esperanto. La balustradon de la hotelo ornamis granda banderolo anoncanta la kongreson kaj apude estis fiksita verda E-flago videbla de malproksime. Do multaj preterpasantoj eksciis pri la ekzisto de Esperanto. Grandan intereson pri la evento montris ĵurnalistoj. Okazis pluraj intervjuoj kaj aperis multaj artikoloj en lokaj ĵurnaloj, elsendoj en radio kaj en televido.

Dum la solena inaŭguro bonvenigis nin la prezidanto de LKK Vito Tornilo, la honora prezidanto de IFEF Romano Bolognesi, la vicprezidanto de la itala E-Federacio Renato Corsetti, la posedanto de la hotelo Fausto Calabresi, la skabeno de la urbodomo kaj la lokaj fervojistoj. Nome de UEA salutis kaj bondeziris sukcesan kongreslaboron Barbara Pietrzak. Salutvortojn aldonis ankaŭ Lina Gabrielli, famkonata itala poeto. Sekvis salutoj de reprezentantoj de la landaj asocioj. LLK-anoj ricevis donacojn de kelkaj salutantoj. Jindřich Tomíšek la ĉefdelegito de IFEF legis alvenintajn salutmesaĝojn. La prezidantino de IFEF Rodica Todor honorigis meritplenajn personojn per diploma kaj, post sia festparolado, ŝi



Rodica Todor honorigis signorino Bolognesi

malfermis la kongreson. Poste sekvis komuna fotado antaŭ la hotelo.



Komuna fotado antaŭ la hotelo.

Dum la kongresa semajno okazis pluraj labor- kaj komitatkunsidoj, prifervojaj fakprelegoj. Kunvenis ankaŭ terminara komisiono por decidi pri kelkaj fervojaj terminoj. Rodica Todor proponis ŝanĝojn kaj reorganizacion de la strukturo en IFEF kaj iniciatis grupan laboron laŭ la modelo de UEA. Oni informis pri movadaj aferoj kaj novaĵoj el la fervoja mondo. Interesis novaĵo el Japanio pri refunkciigita Sanriku-fervojo nur kvin tagojn post la tertremo kaj cunamo en la jaro 2011. Krome estis proponita ILEI baza kurso de Esperanto.

La partoprenantoj ĝuis

ĉiutage vesperajn kulturajn programerojn. Kantis por ni Grazia Barboni, Manuel Rovere regalis nin per romantikaj kantoj kaj de la Trio « Malamuzika » ni aŭskultis napolajn melodiojn. Tre agrabla estis la vespero ekstere en la apuda parko, kie ni aŭskultis belajn italajn melodiojn el la sesdekaj kaj sepdekaj jaroj kaj samtempe ni ĝuis dancrezenton. Ne mankis folkloro prezento kaj posta dancado sub stelplena ĉielo. Surprize nia ĉina samideano kantis itale « O Sole Mio ».



O SOLE MIO

Dum la ekskursoj estis eble viziti Marmuzeon. Kun loka ĉiĉeronino ni promenis tra la urbo aŭskultante klarigojn pri ĉiuj modernaj kaj novstilaj skulptaĵoj. Tre enhavriĉaj estis la kongresaj kaj postkongresaj ekskursoj! Ni vizitis

la urbon Asoli Piceno, kie ni estis akceptitaj en la urbodoma kunvenejo. En Loreto ĉarmis la Sankta Domo, en Recanati palaco Leopardi de la 18-a jarcento, en Castelfidardo ni admiris kolekton da akordionoj kaj viglan akordioniston, kiu regalas nin per gajaj muzikaĵoj. En Ancona ni renkontis s-

ron Aldo Grassini, kiu en ĉi loko iniciatis taktilan muzeon « Omero ».

Oni povas tuŝi ĉiujn objektojn. La muzeo estas konceptita ĉefe por blinduloj. La urbo Ripatransone ĝueblas per sia historia centro kaj famas pro la plej mallarĝa strateto en Italio. En la vilaĝo Offida ĉirkaŭata de vinberejoj ni gustumis tieajn vinojn, kiujn ni povis poste aĉeti. Ĝis nun estas en la urbo praktikata tradicia punkto-arto.

La postkongresaj ekskursoj gvidis nin unue al Frasassikaverno. Admirinda sceno atendis nin subtere. En la urbeto Civitella del Tronto troviĝas la dua plej granda defenda konstruaĵo en



Eŭropo. Ni trapasadis tiun fortikaĵegon de unu ekstrema flanko al la alia. Kaj la postkongresan ekskurson ni finis en la urbo Fermo.

La italaj esperantistoj preparis enhavoriĉan kongreson en agrabla ĉe-mara loko. Laŭdinda estas la belaspekta ilustrita kongresbroŝuro kun bonvenigaj paroladoj de diversaj personoj kaj informoj pri ĉiuj okazaĵoj, pri vizitotaj lokoj dum la ekskursoj. Krome estis eldonitaj tre belaj bildkartoj kaj glumarkoj respegulantaj trafan fervojan simbolon. Ni povis ĝui senpagan tutsemajnan busveturadon tra la tuta urbo. Funkciis ankaŭ libroservo provizita de Petro Chrdle el Ĉeĥio. Ĝuante, ĝojante kaj distriĝante plene ni havis tre bonan impreson pri la ĉijara fervojista E-kongreso. Ĝi estos memorinda pro abundaj kaj tre bongustaj manĝoj en la hotela restoracio Calabresi.

Koran dankon meritas niaj italaj kolegoj kaj ĉiuj, kiuj kontribuis al la bona disvolviĝo de la evento kaj amplene zorgis pri la bonfarto de ĉiuj partoprenantoj!

Liba Gabalda

Sanriku-Fervojo refunkciis

Ĝoja novaĵo estas refunkcigo de Sanriku-Fervojo. Ĝi havas du liniojn: Nord-Liasa Linio kaj Sud-Liasa Linio.

La cunamo detruis stacidomojn, relojn kaj fervojajn pontojn de ambaŭ linioj, entute 317 lokoj estis difektitaj. Ĉiuj funkciuloj de la kompanio estis en granda mal-espero. Multaj antaŭvidis la morton de la linioj, sed la prezidanto de la kompanio s-ro Moĉizuki Masahiko senhezite deklaris: «Post 5 tagoj ni veturigu trajnon, kie tio eblas, kaj senpage ! Kaj ni refunkciigu ambaŭ liniojn plej baldaŭ !»

Tamen por ripari la liniojn, oni bezonis 10,8 miliardojn da enoj (108 milionojn da eŭroj). La urboj laŭ la linioj, la gubernio lŭate kaj multaj homoj postulis de la registaro helpon

al Sanriku-Fervojo, kaj tiu movado sukcesis. S-ro Moĉizuki Masahiko, la prezidanto, diras: «Kiam ni veturigis trajnon 5 tagojn post la cunama atako, multaj loĝantoj larme dankis al ni. Tiu dankemo antaŭenpuŝis nin. Ne ekzistis urboj en Japanio, kiuj prosperis post perdo de la fervojo. Loĝantoj kaj koncernataj komunumoj devas klopodi varti fervojon». La 5-an de aprilo inter la stacioj Kamaŝi kaj Joŝihama (36,6 kilometroj) kaj la 6-an de aprilo inter la stacioj Tanohata kaj Omoto (10,5 kilometroj) trajnoj ekveturis. Dank' al la helpo de Kuvajto 8 modernaj vagonoj estis nove enkondukitaj.

Mi apartenas al grupo, kiu subtenas la 104 geknabojn de la urbeto Tooni, kiu situas inter Kamaŝi kaj Joŝihama. Por celebri la refunkcigon de la trajno, vilaĝanoj kaj lernantoj de Tooni kolektiĝis antaŭ la





*Foriras de la stacidomo Sakari trajno memorfestante
la plenan restarigon de la Linio Minami – Riasu de Sanriku-Fervojo*

stacidomo kaj prezentis tradiciajn spektaklojn, dancojn kaj kantojn. Antaŭ la katastrofo mi neniam vizitis tiun marbordan regionon. Mi ne havis intereson pri tiuj fervojaj linioj, sed poste mi jam vojaĝis kelkajn fojojn laŭ ambaŭ linioj kaj ĝuis belajn pejzaĝojn tra la fenestro. En marto okazis piedvojaĝo tra la tunelo Kuŭadai najbare de la stacio Tooni, kie haltis trajno, kiam okazis la tertremo. Poste loĝantoj uzis la relvojon kiel rifuĝvojon, ĉar vojoj laŭ la marbordo estis detruitaj de la cunamo aŭ blokita de rubaĵoj transportitaj de la cunamaj ondegoj.

Por rememorigi tiun sperton, la kompanio organizis la piedvojaĝon, en kiu mi partoprenis. Do la refunkciigo de la linioj estas ankaŭ

mia ĝojego. Tamen oni ne povas simple ĝoji, ĉar teni la fervojon estos tre malfacile. La urboj kaj vilaĝoj laŭ la linioj estas multe damaĝitaj, kaj multaj loĝantoj jam rezignis reloĝi en sia hejmurbo, do tio signifas mal-multiĝon de pasaĝeroj.

La baza politiko de la registaro kaj la grandaj fervojaj kompanioj estas anstataŭigi neprofitajn trajnliniojn per busservo. Jam Orienta Japana-Relo rezignis refunkciigi la difektitan linion Oofunato sude de Sud-Liasa Linio, kaj sur la pavimita relvojo nun kuras busoj. Inter du Liasa linioj estas linio Jamada, kiun Orienta Japana Relo ne volas ripari, sed vendi al Sanriku-Fervojo, ĉar ĝi antaŭvidis malprofiton el tiu linio.

Hori Jasuo (Japanio)

Vojagoj tra Ĉinio

Vivo en Ĉinio

Mi vivas inter Ĉinio kaj Francio kun mia edzino. Ni estas junaj francaj-ĉinaj emeritaj fervojistoj kaj esperantistaj geedzoj. Ni interkonatiĝis dank'al Esperanto. Somere ni loĝas en Francio kaj dum malpli varmaj sezonoj, ni restadas pli longe en la fervojista kvartalo de la urbo Ĉangŝa (*Changsha*).

Ĉangŝa estas ĉefurbo de la provinco Hunan en suda Ĉinio. Por mi estas giganta urbego (*2,5 milionoj da loĝantoj, entute 6 milionoj kun ĉirkaŭurbo*). Ĝi aspektas pli granda ol Parizo, ĉar tie staras multe da altaj domegoj sur granda vasteco ! Gracia mia edzino diras al mi ke tiu urbo estas ĉina mez-urbo !

Imagu, la kontraston, kutime mi vivas en franca lorena urbeto Nilvange ! Ĝenerale ĉinoj estas agrablaj kun mi ! Familianoj kaj geamikoj de mia edzino ĉiam bone gastigis nin ! Foje mi voj-eraris en la urbo vespere. Mi demandis kie estas nia strato; juna viro de la urbo Kantono helpis min

kaj akompanis min per taksio ĝis nia domo ! Li eĉ pagis la ŝoforon kaj insiste rifuzis, ke mi repagu al li ! Mi iom post iom alktumiĝis al ĉina manĝaĵo ! Mi uzas manĝobastonetojn. Sed pri ĉina lingvo mi nur scias kelkajn vortojn. Pro tio mi sentas min iom izolita ĉar ne povas babiladi kun ĉinoj ! Mi devas pli serioze lerni la ĉinan lingvon ! La vetero estas tre ŝanĝema, vintre estas tre humida kaj iom malvarma, printenpe pluvegas tre ofte kaj somere varmegas multe !

Nia fervojista kvartalo

Nia kvartalo estas en la urbocentro proksime de la stacidomo. Ĝi estas vilaĝo kun preskaŭ cent domegoj sufiĉe altaj je 6 ĝis 9 etaĝoj, granda turo de pli ol 20 etaĝoj, kaj 20-etaĝa regiona sidejo de fervojo. Ŝajnas ke mi estas la nura eksterlandano ĉi tie ! Eĉ en la urbo malofte mi vidas eksterlandanojn ! Kelkfoje oni rigardas min kiel kuriozaĵon, ĉefe kiam mi promenas kun mia edzino aŭ mia bopatrino. Kun mia bopatrino 93-jaraĝa ni salutas aliajn fervojistajn emeritulojn kiujn ŝi konas de longe. Tiu emerita fervojistino ankoraŭ

kapablas supreniri la ŝtup-arojn ĝis la 7a etaĝo kie estas nia loĝejo ! La familianoj de mia edzino estas fervojistoj kiel mi ! Nun najbaroj scias kiu mi estas, dank'al mia bopatri-
no ! Homoj diskutas sidante sur benkoj, ludas kartludojn kaj maĝangon (mahjong). En la sporte-
ejo maljunuloj ludas kroketon kaj junuloj ludas volejbalon. Foje, je la tria matene, eksplodis petardoj por anonci forpason de maljunulino ! Matene, oni rapide muntis grandan tendon apud nia domo. Ĉi-tie homoj manĝis, kaj blovorkestro el 25 viroj vestitaj kiel soldatoj muzikis ! Kantis ĉe mikrofono, sinsekve kantistino kaj kantisto ĝis vespere. La sekvan tagon, pluraj viroj portis la ĉerkon per longa stango, tra la tuta kvartalo. Tiu-ĉi pendas ĉe la stango per ruĝa ŝtofo ĉirkaŭante ĝin. La blovorkestro postsekvas muzikante la ĉerkon kaj malantaŭe la homoj ! Ĉinoj cindrigas la korpojn kaj oni entombigas ilin en tre malgrandan tombon.

Petardoj preskaŭ ĉiutage ekplodas en Ĉangŝa, por festi ion aŭ eble anonci forpason aŭ feliĉan geedziĝon ! Dum printempa festo eksplodas multaj petardoj ! Sub la domegoj en teretaĝo troviĝas diversaj butikoj, malgrandaj restoracioj, frizistoj, riparistoj de televid-

iloj kaj varmigiloj ktp... Oni vendas legomojn, fruktojn kaj viandaĵojn sur plataĵo de triradaj bicikloj aŭ triradaj elektraj skoteroj sur la trotuaroj. En proksima bazaro aĉetebblas diversaj legomoj, fruktoj, kapsikoj, vivantaj birdokortaj bestoj kaj fiŝoj, kiujn oni buĉas surloke por la klientoj. Diversaj odoroj de kapsikoj, tofuo (*tofuo estas origine azia manĝaĵo farita el soj-faboj*), kaj rostitaj viandaĵoj bonodorigas la stratojn ĉirkaŭ la bazaro. Surstrate, en nia kvartalo, akrigisto alvokas homojn per eta laŭtparolilo, por akriigi tranĉilojn, kaj feraĵisto kolektas feraĵojn. En nia kvartalo kaj urbo multaj restoracioj malgrandaj aŭ grandaj proponas tre diversajn bongustajn manĝaĵojn de la provinco Hunan aŭ de alia provinco. Nekredebla estas la nekalkulebla nombro de vendejoj en la tuta urbo. Oni vendas ĉion ! Ĉe nia strato multaj butikoj vendas amase multajn komputilojn, printilojn, fotokopiilojn, poŝtelefonojn ktp... Hejme per kabla televido, krom multaj ĉinaj programoj, ni ricevas fakan programon pri fervojaj aktualaĵoj ! Foje Gracia montris al mi libron pri la stacidomo de Ĉangŝa, kie ŝi laboris kiel oficistino. Tiun libron fervojo eldonis okaze de la 30-a datreveno de la stacidomo ! Mi vidis en tiu albumo multajn

fotojn pri fervojista laboro, pri grupoj de kantistoj, muzikistoj kaj sportistoj. Oni fotis grupojn de fervojistoj, eĉ oficist(in)oj en uniformo kiuj aspektis kiel soldatoj !

Vivnivelo kaj ekonomio

La vivnivelo en Ĉinio ĝenerale pliboniĝis post la epoko de Mao sed ne por ĉiuj ! Nun estas multaj riĉuloj, mezriĉuloj kaj pli multe da malriĉuloj. Riĉuloj kaj mezriĉuloj vivas en pli luksaj domoj en kvartaloj sekurigataj per bariloj kaj gardistoj kiel en Usono ! En la kamparo la homoj estas pli malriĉaj ol en la urbego. Pro tio multaj kamparanoj laboras ĉie-tie. Ili konstruas domegojn, vojojn kaj subtrajnon por akiri monon, laŭdire. Plurfoje mi vidis domaĉojn, sen fluanta akvo, kie vivas malriĉuloj eĉ malriĉaj fervojistoj ! Ofte mi vidis tre mizerajn

homojn surstrate ! Kontraste, luksajn vestaĵojn, brakhorloĝojn, juvelojn, vinon, aŭton el la plej famkonataj kompanioj el la tuta mondo oni vendas en Ĉangŝa kiel en ĉiuj grandaj urboj de Ĉinio. En la urbo multaj tre luksaj hoteloj, restoracioj kaj bankoj estas nombraj !

En Ĉinio oni nomas la ekonomion \square merkata socialismo \square sed estas vera kapitalismo ! Ĉie regnas kulturo de laboro kaj mono ! Ĉiutage, eĉ dimanĉe oni laboras, eĉ banko, poŝtofiĉejo; oni konstruas domegojn, vojojn kaj subtrajnon. La 1-an de majo, bankoj estis malfermitaj, nur ŝtataj oficejoj ne funkciis, kaj lernantoj feris. Sed la sekvantan dimanĉon malfermiĝis denove la ŝtatofiĉejoj. Multaj vendejoj funkcias ĝis malfrue vespere. Oni ne rajtas striki kaj manifestacii ! Ĉinio estas tre produktivma lando ! Ĝenerale ĉinoj estas laboremaj ! En ĉionvedejoj kuŝas amaso da varoj kiel en okcidentaj landoj ! Certe multe da neutilaj objektoj, kiujn oni ĵetos en rubujon post kelkaj monatoj ! Do, malŝparo de materialoj kaj energio kiuj endanĝerigas la estont-econ de nia blua planedo kiel en multaj landoj !



*Luksaj
magazenoj
sur
strato
en
Ĝangŝa*

Densa trafiko !

Tiu urbego estas tre laciga

ĉar la trafiko estas tre densa kaj ŝoforoj kutimas hupadi, kiam ili alproksimiĝas al aliaj veturiloj aŭ piedirantoj ! Ŝajnas ke la stirantoj havas pli da rajtoj ol la homoj piedirantaj ! Ĉiam mi atentemas, ĉar multaj elektraj skoteroj silente preterpasas piedirantojn tre proksime kaj transiras vojkruciĝon eĉ kiam la semaforo ekruĝiĝas ! Busoj en la urbo veturas tre rapide kaj bremsas forte kaj subite ! Oni devas firme sin teni en busoj ! Malnovaj traktoroj, kiuj transportas diversajn varojn pafkrakas kaj elirigas nigran fumon ! Fine de aprilo ektrafikis en Ĉangŝa la unua subtrajna linio (N°2) 22 km-ojn longa. Ĝi estas tre moderna kaj iras de stacio Wangchengpo al Guangda tra la ĉefa stacidomo kaj la suda stacidomo (TGV). Nia kvartalo estas proksime de haltejo Yuanjialing ! Ĉirkaŭ la 2020-aj jaroj, la subtrajna reto estos 6-linia kaj 314-kilometra (pli longa ol en Parizo) ! Ĉinoj konstruas trajnojn kaj boradas tunelojn rapide !

Vizitindaĵoj en Ĉangŝa

Ĉangŝa en 1938 estis incendiata fare de Kuonmitang regita de Ĉiang Kai-Ŝek, por ke japanoj ne povu preni la riĉaĵojn de la urbo. La urbo perdis sian tutan 2500-jaran historian heredaĵon ! Pro tio estas

malmulte da vizitindaĵoj. Nur la urba kaj provinca muzeoj, kiujn oni rekonstruas, estas interesaj. Laŭ mi la ĉefaj, plej agrablaj kaj kvietaj vizitindaĵoj estas la diversaj parkoj, grandaj aŭ malgrandaj, kie feliĉe homoj povas ripozi, promeni, boati, muziki, danci, gimnastiki kaj praktiki « *Tajĝiĉuan* » laŭ ritmo de bela ĉina muziko ! La ĉinaj parkoj estas tre arte aranĝitaj kun gazono, floroj,



Ĉangŝa Ŝaŭen parko

arbustoj. Rande de Ĉangŝa mi vizitis la monton Yuelu, kie staras antikva universitato kaj bela arbaro kun multaj vojetoj. Tre plaĉas al mi la tre granda parko de Martiroj ĉe granda lago, en kies mezo estas insulo kun pagodoj. Ĉinaj turistoj pilgrimas ĉefe en la insulo Oranĝo, kie staras enorma kapo de la juna Mao ! La insulo Oranĝo kuŝas meze de la tre larĝa rivero Xiang Jiang. Mao Zedong nakskiĝis proksime de Ĉangŝa en la urbo Shaoshan kaj poste li lernis en

Ĉangŝa. Ĉi tie naskiĝis la ĉina komunismo !

Vojaĝo per trajno

Pasintjare kaj en la nuna jaro, dum entute 8 monatoj dank'al Gracia mi vizitis en Ĉinio multajn vidindaĵojn, antikvajn urbojn, montarojn, belajn naturlokojn ! Ni renkontis esperantistojn en kelkaj urboj kaj partoprenis E-o aranĝon en Wuhan kaj Zaozhuang, kie staras tute nova Internacia Esperanto Muzeo. Mi rakontas pri tiuj lokoj kaj urboj en mia longa vojaĝkajero: Shaoshan, Xiantan, Kantono, Shenzen, Insulo Hainan, Wuhan, Nanchang, Hangzhou, Ŝangajo, Suzhou, Wuxi, Guilin, Zhangjiajie, Pekino, ĉina murego (Badalin), Tianjin, Zaozhuang, Tai'erzhuang, Lago Weishan, Qufu, Huainan, Yueyang, Xian, Hoh-

hot. Por atingi tiujn lokojn ni veturis per trajno sur pli ol 18000 km-oj da trakoj. Ni vivis tage kaj nokte en malmola kuŝvagono aŭ veturis kelkajn horojn per fulmrapidaj trajnoj je ĉirkaŭ 320 km/hore. Kuŝvagonoj estas tre popularaj. Amasoj da homoj uzas ĝin ĉefe dum la printempa festo, la plej grava festo en Ĉinio. Kupeo de malmola kuŝvagono, sen pordo, enhavas ses litetojn kun littukoj, kovriloj, kapkuseno kaj unu granda botelo da varma akvo. Varman akvon oni prenas el akvo varmigiĝilo ĉe enirejo de la vagono. Tiu varma akvo estas utila por teo, manĝaĵoj kaj nudeloj senhidratigitaj en plasta bovlo. En mola klaso estas nur kvar litetoj kun pordo, kiu fermas la kupeon. Estas ankaŭ malmolaj pasaĝervagonoj kun sidlokoj sed iom malkonfortaj ĉar ili estas plenplenaj. Kelkfoje por mallonga tempo ni veturis per fulmrapida trajno je 320 km/h. Ĉangŝa situas ĉe la plej longa grandrapida ĉina linio Pekino-Wuhan-Kantono-Shenzen 2400 km-a. Trajn bileto de fulmrapida trajno estas trioble pli kosta ol la malmola klaso ! Por tiuj kiuj ŝatas vojaĝi per trajno eblas veturi de Pekino al Moskvo tra Mongolio kaj Siberio (7865 km-ojn en 5 tagoj en ĉina trajno) aŭ tra Mandĉurio kaj Siberio (9025 km-ojn en 6 tagoj en



Granda Murego Badalin

rusa trajno). Poste, de Moskvo al Parizo tra Varsovio kaj Berlino (3000 km-ojn en 38 horoj en rusa trajno). Mi revas trajnveturadi de Francio al Ĉinio, ĉar ĉiam mi enuas en aviadilo, ĉar oni ne vidas pejzaĝon kaj la vivon de popolo !

Impresoj

Ĉinio estas samtempe antikva kaj moderna lando, hejmeca kaj stranga, tre urba kaj ĉefe kampara, samtempe tradicia kaj noviganta, futurisma kaj malmoderna... Ĉinio mirigas vojaĝantojn per multaj malakordigantaj aferoj. Multaj eblecoj malfermiĝas al ili por viziti ĝin...

Bonvenon en Kunming

Venontjare okaze de la 67a-IFEF kongreso en Kunming eblos vojaĝi en Ĉinion kaj malkovri

Ŝtonarbaro en Kunming



Yunnan, la plej belan provincon el tuta Ĉinio ! Ĝi havas tre diversajn kaj belajn pejzaĝojn. Loĝas ĉi tie mozaiko el popoloj kun multaj kulturoj. Kunming oni nomas ☞ la prin-tempa urbo ☞, ĉar la klimato estas ĉiam dolĉa en la kvar sezonoj. Mirindaj parkoj kuŝas en la urbo !

Mi

ankoraŭ ne vizitis Yunnan kaj Kunming sed mia edzino, kiu spertis multe da vojaĝoj en Ĉinio,

rakontas al mi pri tiu mirinda provinco kaj rekomendas al vi, karaj legantoj kaj geamikoj, partopreni la kongreson kiu okazos de la 16-a ĝis la 23-a de majo 2015. La loka kongreskomitato LKK

<67ifekongreso2015@gmail.com>

kaj Ĉina Fervoja Esperanto Asocio (ĈFEA) organizas interesan programon kaj ekskursojn.

Bonvenon en Ĉinio kaj Kunming. Ni atendas vin !

Bruno HENRY



La 67-a Kongreso de IFEF
Kunming, Ĉinio 16-23.05.2015
第67届国际铁路员工世界语大会
中国·昆明

SPECIALA RENKONTIĜO EN NEPALO

Nepalaj esperantistoj organizis tre sukcesan “Specialan Renkontiĝon” de la 6-a ĝis la 17-a de marto 2014. Partoprenis ĝin ne nur nepalanoj, sed ankaŭ 17 Ĉinoj kaj eŭropanoj el Belgio, Bulgario, Danio, Francio, Pollando kaj Svislando. La aventuro komenciĝis en la ĉefurbo Katmanduo. La akcepto estis varma, laŭ nepala kutimo oni tuj post la alveno ornamis nin per florkolĉenoj. Post la enhoteliĝo en la komerca



kvartalo *Thamel* en hotelo *Marshyangdi* ni iom promenis akompane de nepalaj esperantistoj tra urbaj stratoj plenaj je turistoj.

La sekvan tagon ni vizitis lokajn vidindaĵojn: hindan templon



Pashupatinath kaj budhan stupaon *Boudhanath*. En la proksima urbo *Patan* ni promenis kaj admiris artaĵojn faritajn el ligno. Elstaras tie la Kriŝna templo. Vespere okazis interkonatiĝo kun nepalaj samideanoj. La prezidantino de la Nepala Esperanto-Asocio (NEspA) Indu Devi Thapaliya, Mukunda Raj Pathik kaj aliaj membroj, post solenaj paroladoj, malfermis la eventon. Ĉeestis ankaŭ reprezentantoj el la orienta parto de Nepalo familio Pokhrel, kies ĉarma 13-jara filo bonege parolis Esperanton.

Sabate la 8-an de marto, ni vojaĝis al la nacia parko *Chitwan* - Koro de ĝangalo. Unue ni pirogumis kaj poste ni vizitis elefantofarmon kaj rajdis elefantojn. Ni estis bonŝancaj vidi deproksime rinocebrojn kaj aliajn bestojn. En la parko



la naskiĝlokon de Budho. Ni admiris *Maya Devi* templon kaj ankaŭ aliajn vidindaĵojn. En *Palpa* ni tranoktis. En la urbo *Pokhara* renkontis nin loka esperantisto Himalal Parajuli kaj pretigis por ni la jenan programon: matene ni per malgranda boato

trov-iĝas simioj, cervoj, aproj, multaj specoj de birdoj, krokodiloj kaj laŭdire eĉ tigroj, kiujn ni feliĉe ne renkontis. Impresis grandegaj termitejoj. Post la reveno okazis kelkaj prelegoj: pri la Esperanto-instruado laŭ la metodo BEK rakontis Peter Wraae el Danio. Arie Bouman el Belgio prezentis bildojn el Islando kaj parolis pri siaj spertoj dum la 98-a UK en Rejkjaviko. La sekvan vesperon ni spektis tre belan folkloran programon de popolaj indiĝenaj dancoj.



navigis sur la *Phewa* lago ĝis insuleto, kie troviĝas hinda *Barahi* templo. Sinsekve ni vizitis *Binhdabasini* templon, *Mahendra* kavernon kaj *Seti* gorĝon. Post la tagmanĝo ni vizitis la Internacian Himalajan Muzeon kaj poste ni ekskursis al la pagodo de Paco. Fine de la tago ni ankoraŭ sukcesis vidi *Davis* akvofalon. Vespere ni povis ĝui hotelan dancprogramon. Sekvan matenon ni ellitiĝis tre frue kaj veturis al la montara vilaĝeto *Sarangkot* spekti sunleviĝon kaj vidi la Annapurna montaron. Poste ni havis liberan tempon por promenado aŭ aĉetado. Posttagmeze okazis serio da prelegoj. Peter el Danio prelegis pri la

En la urbo *Lumbini* ni vizitis




dana filozofo “Martinus”, Eduard Kusters el Belgio pri la “Belga kompromiso”, Pierre Bouvier el Francio klarigis, kial Esperanto estas pli simpla kaj efika ol baza angla lingvo. Barbara Pochanke el Svislando prezentis sian Esperanto-karieron kaj ĉe la fino Roman Dobrzynski el Pollando montris ege interesan filmon pri Oomoto, kiun li mem reĝisoris kaj produktis. Post solenaj paroladoj la vespero finiĝis per komuna vespermanĝo.

Sabate la 15-an de marto ni forveturis al Katmanduo kaj vespere ni ĉiuj estis invititaj al solena geedziĝa festo: s-ro Parashar Rijl edzigis sian filon. Ni ĝuis belan festadon kun viva muziko kaj bongusta manĝo. Dimanĉe en Nepalo okazis festo de koloroj: *Holi*. Dum ĝi, homoj, sed ĉefe gejunuloj, kolorigas al si kaj al aliuloj la vizaĝon kaj la vestaĵojn. Ankaŭ ni ne eskapis tiun eventon kaj farbitaj ni promenis inter la homamaso. Matene ni vizitis la religian ensemblon *Swayambhunath*, kiu troviĝas sur arbokovrita monteto. Ĝi estas konata kiel templo de simioj, kaj vere ili kuris ĉie samkiel en *Pashupatinath*. Ĉi-foje la tagmanĝon pretigis volontuloj en la sidejo de NEspA. Ni ĝoje



babilis, kantis kaj dancis. Ankaŭ dum la adiaŭa vespero ni bone amuziĝis. Nepalanoj donacis al ĉiu tipan ĉapon *topi*, ŝalono kaj monujon. Maja Gorova el Bulgario prezentis sian landon kaj ties kulturon. Ilse Jacques el Belgio dankis al ĉiuj pro la bela renkontiĝo, kiun ŝi povis preskaŭ tute partopreni malgraŭ sia paŝproblemo.

La Speciala Renkontiĝo 2014 sub la gvido de Bharat K. Ghimire estis tre sukcesa, ĉiuj estis ravigitaj. Ni kore dankas al la organizantoj de tiu unika evento kaj gratulas ilin pro la iniciato organizi tiun-ĉi specan aranĝon. Mi esperas, ke la movado en Nepalo daŭre floros kaj plifortiĝos. Sukceson al vi!

Liba Gabalda



Pagodo de la Paco



J'ai rendez-vous avec vous !!!

Mi rendevuas kun vi kaj regionaj agadoj kaj... la gastemeco... Ĉi sube vi povas trovi kontakteblojn de respondeuloj de via FFEA-sekcio.

J'ai rendez-vous avec les activités régionales et la convivialité... Vous pouvez trouver ci-dessous les coordonnées des responsables de votre section AFCE.

Urbo aŭ Regiono	Prezidanto aŭ Delegito	Telefono	Retadreso
Caen	A.Dubois	02 31 82 31 45	andre.dubois@fnac.net
Lyon	A.Delorme	04 26 65 07 28	delormea48@gmail.com
Paris - IDF	D.Happi Fosso	06 83 14 30 23	denise.happi.fosso@gmail.com
Quimper	P. Le Vern	02 98 56 21 94	plevern@wanadoo.fr
Toulouse	A.Mirc	05 62 89 92 96	andmir@wanadoo.fr

**Merci d'envoyer vos articles à André Delorme (Lyon)
Articles de 200 à 250 mots accompagnés de 2 ou 3 photos.**

Kiel lerni Esperanton ?

Konversacia rondo :

Ĉe la sidejo : la lastan merkredon de ĉiu monato,
ekde 17:30 - (tel.: 01 46 36 00 04)

Perkorespondaj kursoj

Dum la tuta jaro, je via ritmo.

Staĝo en Francio kaj eksterlande:

La datoj por 2015 estas definitaj.

Pour tous renseignements, s'adresser à : Christian Dardenne - 9 rue de château-Landon
FR 75475 Paris Cedex 10 / Retadreso : stage.esperanto-afce@laposte.net

Comment apprendre l'espéranto ?

Réunion de conversations :

Au siège : le dernier mercredi du mois,
à partir de 17 h 30 - (tél.: 01 46 36 00 64)

Des cours par correspondance

Toute l'année, à votre rythme.

Stage en France et à l'étranger :

2015 : datoj difinitaj

Retrouvez-nous sur le web :

<http://ifef.free.fr/afce> aŭ <http://ifef.free.fr/ffea>

Abonnement annuel :	13 € / Banque Postale. : A.F.C.E. 7 402 60 L Paris
Directrice de Publication :	Sylviane Lafargue : 9 rue de Château Landon - FR 75475 Paris (10)
Rédactrice :	Bernadette Deschanel : 64 chemin du grand Montagné 30400 Villeneuve-lès-Avignon retadreso : b.deschanel.30@gmail.com
Correcteur :	J. P. Ducloyer : jeanpierre-ducloyer@club-internet.fr
Imprimerie :	U.A.I.C.F. 9 rue de Château Landon—PARIS 10 ^e C.P.P.A.P. 0311687773